

Johann Wolfgang von Goethe,

Majkanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Belege brilas
Natur' kaj sun',
Kaj ĉio ridas
Ĉirkauŝe nun.

Eliĝas floroj
El ĉiu plant',
El arbustaĵo
Milvoĉa kant'

Kaj ĉiuj sentas
Feliĉon nur.
Ho ter', ho suno!
Ho ĝoj', ho plezur'!

Ho am', ho amo!
Ja kiel or'
Vi estas bela,
Kaj kiel aŭror'!

La freŝan kampon
Benegas vi,
La plena mondo,
Floregas ĝi.

...

Knabin', ho knabino,
Mi amas vin!
Vi min rigardas
Kaj amas min.

Alaŭda kanto
En la aer',
Ĉiele odoras
La tuta ter'.

Ho kiel varme
Mi amas vin,
Vi min ĝojigas,
Ho junulin'!

Kuraĝon vi donas
Al nova kant',
Feliĉa deziras
Vin via amant'!

*Traduko de la Germana poemo "Mailied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1994.*

MR-22-2 / Arg-261-526 (2004-09-06 05:48:22)